LA FENESTRO

Kaŭzoj kaj rezultoj

Ŝajne, nia menso estas kvazaŭ programita por ligi ĉiujn rezultojn kun ties probablaj kaŭzoj. Eble temas pri darvinisma afero, ĉar niaj prauloj, kiuj, danke al atenta observado de kelkaj fenomenoj, taŭge povis intuicie diveni kaŭzojn por antaŭvidi danĝerajn rezultojn, kapablis heredigi siajn genojn pli bone ol tiuj, kiuj vidante, ekzemple, grandan beston malsatan antaŭ si, tute ne suspektis kio povus okazi. Tio signifas, ke ni mem – posteuloj de tiuj, kiuj, junaĝe, ne iĝis bestonutraĵo – bezonas nepre trovi kialojn kaj kielojn por la okazantaj aferoj de nia ĉirkaŭaĵo. Tamen – ĉiam taŭgas tameni, se oni deziras kompreni pli bone nian mondon – ekzistas, ni diru, flankaj damaĝoj, ĉar kiam ne eblas trovi logikan klarigon, kelkaj homaj estaĵoj – gefratoj niaj, ĉiuj el ili – elpensas frenezajn teoriojn, pro tio ke, genetike, ne eblas lasi rezulton senkaŭze.

Antaŭ kelkaj jaroj Javier Guerrero esperantigis tre amuzan novelon titolitan *La unua seria murdisto de la (pra)historio* de la kataluna verkistino Teresa Solana. En ĝi, la plej lerta el aro de viraj trogloditoj devas solvi la misterajn sinsekvajn mortojn de tri samtribanoj. Se Solana pravas, ni povas konfirmi, ke la tiutempa homa menso jam klopodis ligi kaŭzojn kaj rezultojn. Unu el la grotuloj faris la jenan komenton antaŭ la senviva korpo de la tria viktimo: “mi rimarkis la sangmakulitan ŝtonon, kiu restis je malmultaj metroj de la korpo [...] kaj sugestis [...] ke eble la du faktoj interrilatas”. La ŝlosilo por solvi la misteron kuŝas en la jena rezonado de la enketisto: “Se [ni] la maskloj malkovrus la sekretojn de inoj por naski, la povo, kiun ili posedas super ni, malaperus”. Do, la verkistino semas kelkajn spurojn, por ke ni, legantoj spertaj pri konektado de kaŭzoj kaj rezultoj, komprenu, ke tiujn tri virojn mortigis la matriarko de la klano mem, ĉar ĉiuj tri viktimoj, sinsekve, eksuspektis la ekziston de ligo inter certa para ago kaj ties rezulto post kelkaj “lunperiodoj”. La ĉefino minacas la enketiston esti la kvara morto-nto kaj sugestas, ke por savi sin, li anoncu al la tuta tribo, ke la kaŭzo de la tri mortoj estis iu freŝbakita “dio”, kiu punis ilin pro tio, ke ili ŝovis la nazon en fremdan vazon.

Kaj fakte, dum multegaj lunperiodoj iaspeca supra ĉiopova estaĵo estis la ĉionfaranto, kiam la homaro ne komprenis ajnajn kialojn kaj kielojn. La *dia kolero* kaŭzis fulmojn kaj tondrojn, erupciojn kaj tertremojn, inundojn kaj epidemiojn, ĉefe por puni la aĉajn popolojn. Bonŝance, nuntempe estas tre malofta la ekstrema kredo je tiaj teruraj diaj agoj. Tamen, ankoraŭ multaj homoj kredas je neperceptebla energioj, uzas miraklajn lesivojn por sanigi ĉiujn malsanojn, kaj kredas diveni la estontecon per kartoj, manaj faltoj, aŭ en la kafaj restaĵoj “legeblaj” sur la fundo de la taso. Feliĉe, mi kredas je neniu el tiuj aferoj, ĉar, naskiĝinte komence de aprilo, mia zodiaka signo estas Ŝafo.

[*La unua seria murdisto de la (pra)historio* de Teresa Solana, esperantigita de Javier Guerrero, estas elŝutebla en *https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/*]

Viktoro Solé